

Philippe Planchon

Université de Tours, Francio

Evoluo de la afiksoj kaj de ilia memstara uzo en Esperanto

Resumo: Kvankam Esperanto estis komence ellaborita kiel lingvo-projekto, ĝi fariĝis iom post iom vivanta lingvo por sia komunumo de parolantoj. La uzo de vasta sistemo de afiksoj en Esperanto povus esti konsiderata kiel la simptomo de tiu artefarita deveno. Tamen laŭ etimologia vidpunkto oni vidas, ke Esperanto prunteprenis siajn afiksojn de naturaj lingvoj, ĉefe de hind-eŭropaj lingvoj. Malgraŭ tio, problemo aperas kiam oni konsideras la memstaran uzon kiu povas esti aplikata al tiuj afiksoj, pro tio ke tia uzo ŝajnas iel nekutima afero. Tio instigas nin interesiĝi pri la sistemo de la afiksoj en Esperanto, esplorante tiun sistemon laŭ diakrona perspektivo. Tiu esploro estas bazita sur la korpuso de Tekstaro, kaj ĝi disvolviĝas per komparo inter la derivila uzo kaj la memstara uzo de tiuj afiksoj. La evoluo de tiu sistemo alportas pli klaran vidon pri la lingvaj procezoj kiuj funkcias interne de Esperanto, lingvo kiu emas fariĝi natura lingvo post sufiĉe signifa periodo de tempo.

Ŝlosilvortoj: afiksoj; Esperanto; memstara uzo; diakrona evoluo

1 Enkonduko

Esperanto unue aperis kiel lingvo-projekto, sed ĝi fariĝis vivanta lingvo (Fiedler kaj Brosch 2022). De 1887 la lingvo fakte evoluis, sed tiu fenomeno estas kompleksa. Tio signifas, ke laŭ tipologia vidpunkto Esperanto estas kaj ordinara lingvo, kaj tute aparta lingvo. Esperanto ja similas al aliaj etnaj lingvoj (Koutny 2015). Sed la lingvo konsistis komence el normo (Zamenhof 1887), kiu ne estis uzata de parolantoj. Poste ekaperis uzado de la lingvo kaj parolantoj de la lingvo. Do iom post iom la lingvo atingis certan gradon de ensociiĝo (Blanke 1985), kaj delonge ĝi ne plu estas lingvoprojekto.

Pro tio oni povas distingi diversajn evolu-fazojn (Koutny 2018; Planchon 2021). Kadre de tiu artikolo sufiĉas almenaŭ distingi tri ĉefajn fazojn. La unua evolu-fazo [1878–1887] rilatas al la ellaborado de la lingvo-projekto. Tiuj unuaj provoj nomiĝas pra-Esperantoj (Mattos 1987; Kiselman 2011). Ekde la pra-Esperantoj ĝis la publikigo de la *Unua Libro*, Zamenhof elprovis diversajn solvojn kaj eksperimentis pri la lingvo-projekto, aparte per intensa traduko-

laboro. La dua evolu-fazo [1887–1905] ankoraŭ ne tute similis al la ordinara evoluo de la etnaj lingvoj, ĉar tio estis periodo de elprovoj kaj de diskutoj pri reform-projektoj. Sed ekde la unua Universala Kongreso kaj la adopto de la *Fundamento* (Zamenhof 1905) la lingvo fortikiĝis kaj vere stabiliĝis. La tria evolu-fazo [ekde 1905 ĝis nun] estas la “semiologia vivo de la lingvo” (laŭ la esprimilo de Ferdinand de Saussure), kaj la lingvo similas al aliaj etnaj lingvoj kaj ĝis nun evoluas senrompe kiel evoluas aliaj etnaj lingvoj laŭ diversaj aspektoj. Jen kiel Ferdinand de Saussure jam en 1916 antaŭvidis tiun evoluon eĉ por Esperanto:

Cette évolution est fatale; il n’y a pas d’exemple d’une langue qui y résiste. Au bout d’un certain temps, on peut toujours constater des déplacements sensibles.

Cela est si vrai que ce principe doit se vérifier même à propos des langues artificielles. Celui qui en crée une la tient en main tant qu’elle n’est pas en circulation; mais dès l’instant qu’elle remplit sa mission et devient la chose de tout le monde, le contrôle échappe. L’espéranto est un essai de ce genre; s’il réussit, échappera-t-il à la loi fatale? Passé le premier moment, la langue entrera très probablement dans sa vie sémiologique; elle se transmettra par des lois qui n’ont rien de commun avec celles de la création réfléchie, et l’on ne pourra plus revenir en arrière. L’homme qui prétendrait composer une langue immuable, que la postérité devrait accepter telle quelle, ressemblerait à la poule qui a couvé un œuf de canard: la langue créée par lui serait emportée bon gré mal gré par le courant qui entraîne toutes les langues. (de Saussure 1916/1995, 111)

‘Tiu evoluo [de la lingvoj] estas fatala; ne estas ekzemplo de lingvo kiu rezistas al ĝi. Post kelka tempo, oni ĉiam povas konstati percepteblajn movojn.

Tio estas tiel vera ke la principo validas eĉ por artefaritaj lingvoj. Kiu kreas lingvon havas ĝin sub sia regado dum ĝi ne cirkulas; tamen, ekde la momento en kiu ĝi plenumas sian mision kaj fariĝas ĉies posedaĵo, ĝi eskapas kontrolon. Esperanto estas tiuspeca provo: se ĝi triumfos, ĉu ĝi eskapos el tiu fatala leĝo? Post la unua momento, la lingvo tre probable eniros en sian semiologian vivon; ĝi transdoniĝos laŭ leĝoj kiuj nenion komunan havas kun tiuj de pripensita kreado; kaj ĝi ne plu povos malantaŭen paŝi. Homo kiu intencus krei neŝanĝeblan lingvon, kiun posteuloj devus akcepti tian, kia ĝi estis ricevita, similus al kokino kiu kovis anasan ovon: la lingvo de li kreita estus fortrenita, ĉu li volus aŭ ne, de la fluo kiu kunportas ĉiujn lingvojn.’ (de Saussure 1916/2022, 88)

Se oni konsideras la historion de la lingvo Esperanto, oni do povas pri-demandi pri la evoluo de la afiksoj. De kie ili devenas? Kiel oni uzas ilin

nuntempe? Ĉu la memstara uzo de la afiksoj estas stranga propraĵo de Esperanto, aŭ ĉu tiu uzado estas natura evolu-vojo de la lingvo?

2 Etimologio de la afiksoj

Kiam oni konsideras la devenon de la afiksoj en Esperanto, oni povas rigardi la etimologion de tiuj vortelementoj. Unuavide Esperanto aspektas kiel eŭropa lingvo pro la deprunto de latinidaj, ĝermanaj kaj slavaj radikoj por la leksiko. Tio ankaŭ validas se temas pri afiksoj, kiel montras kelkaj ekzemploj pri la etimologio de la afiksoj de Esperanto (laŭ Waringhien 1959, 64–69):

bo- [peredziĝa parenceco] < fr. *beau-* (*beau-père* ‘bopatro’)
mal- [kontraŭa ideo] < fr. *mal-* (*malheureux* ‘malfeliĉa’)
-aĵ [konkreta objekto] < fr. *-age* (*lainage* ‘lanaĵo’, *laitage* ‘laktaĵo’)

ek- [komenciĝo de procezo] < gr. *ek-* (*eklampeîn* ‘ekbrili’)
-id [ideo de naskiteco] < gr. *-id* (*Pelopidès* ‘idoj de Pelops’)

-aĉ [senvalorigo] < it. *-accio* (*lettaccio* ‘malbona lito’)
-iĝ [ŝanĝo de stato] < it. *-eggiare* (*verdeggiare* ‘verdiĝi’)
-uj [afero kiu entenas] < it. *-oi-* (*mangiatoia* ‘manĝujo’)
-ec [kvalito aŭ stato] < it. *-ezza* (*bellezza* ‘beleco’)

-end [deviga] < lat. *-endus* (*legendus* ‘legenda’)
-ar [kolekto kiel tuto] < lat. *-arium* (*vocabularium* ‘vortaro’)
-an [membro aŭ loĝanto] < lat. *-an* (*Romanus* ‘Romano’)

-ej [loko] < germ. *-ei* (*Bäckerei* ‘bakejo’)
ge- [de ambaŭ seksoj] < germ. *Ge-* (*Geschwister* ‘gefratoj’)

-eg [plej alta grado] < ru. *-jaga* (*dvornjaga* ‘dika hundo’)
pra- [plia grado de parenceco] < ru. *pra-* (*praded* ‘pra-avo’)

-op [en grupoj de] < lit. *-ópas* (*dvejópas* ‘duope’)

-ig [efiko de kaŭzo] < germ. *-igen* (*reinigen* ‘purigi’) / lat. *-igare* (*purigare* ‘purigi’)
-il [instrumento] < ru. *-il* (*kormilo* ‘ŝipstirilo’) / fr *-ail* (*gouvernail*) / germ. *-el* (*Schlüssel* ‘ŝlosilo’)
re- [ripeto], *-et* [malalta grado], *-in* [sekso], *-ebl* [povas], *-ist* [profesio], *-ism* [doktrino]...

Tabelo 1: Etimologio de la afiksoj en Esperanto (vd. Waringhien 1959)

Kelkaj afiksoj (ĉi tie en la lasta parto de la listo) ne devenas de ununura fonto, sed de pli larĝa grupo de lingvoj (latinidaj aŭ hind-eŭropaj, kie ilia uzo ĝeneraligis), ekzemple: *re-*, *-et*, *-in*, *-ebl*, *-ist*, *-ism*.

3 Memstara uzo de la afiksoj

Tamen, malgraŭ tiu aspekto de eŭropa lingvo Esperanto ne funkcias kiel hind-eŭropa lingvo ĉe la morfologia nivelo. Fakte pri tiu diferenco inter la supraĵa aspekto kaj la profunda strukturo de la lingvo Zamenhof mem tute konsciis, kiel li klarigas en la antaŭparolo de la *Unua Libro*:

Mi aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj* vortoj. Se vi prenos verkon, skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas *ĉiam* kaj *sole* en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj alkutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne traleginte antaŭe la antaŭparolon (kiu por la lernanto estas tute senbezona), – li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.

(Zamenhof 1903, 248)¹

Komence tiu originaleco de Esperanto estis interpretata kiel skemisma karaktero de la lingvo kadre de la ĝenerala opozicio inter skemismaj lingvoj (ekzemple Volapuko) kaj naturalismaj lingvoj (kiel Occidental). Tiurilate la solvo de Esperanto ja estas originala. Ne temas pri hazarda elekto de afiksoj (kiel faris ekzemple Schleyer por Volapuko), ĉar tiuj afiksoj de Esperanto etimologie rilatas al la naturaj lingvoj. Aliflanke, ne temas pri limigita prunteprenado de jam ekzistantaj derivaĵoj, kiel okazas en la naturalismaj lingvoj, kiuj ricevas kaj uzas afikson el latinida lingvo nur konforme al la uzo de tiu afikso en la fonta lingvo. Do post ricevo de la afikso en Esperanto tiu ĉi funkcias sendepende de la fonta lingvo, kaj povas eĉ fariĝi memstara vorto de la lingvo.

Laŭ morfologia vidpunkto tiu funkciado de Esperanto kun memstaraj vortunuoj ne estas tiom artefarita, kiom ĝi aspektas unuavide. Tiu mekanismo ja ekzistas en naturaj lingvoj, kvankam temas pri ne-eŭropaj lingvoj. Fakte Zamenhof konis almenaŭ unu ne-eŭropan lingvon, nome la hebrean, kaj eble tiu lingvo inspiris al li la ideon dismeti la vortojn el diversaj

¹ La *Unua Libro* (Zamenhof 1887) aperis en la rusa kaj aliaj etnaj lingvoj. Mi citas ĝin laŭ la esperantlingva traduko aperinta en la *Fundamenta Krestomatio* (Zamenhof 1903, 248).

vorteroj. Eĉ la eŭropaj lingvoj povas foje prezenti similan funkciadon, ĉar la afiksoj ne ĉiam okazigas ŝanĝon de la radikoj. Do Zamenhof reguligis en Esperanto la derivadon de la vortoj per afiksoj. Ĉiukaze eblas kompreni tiun principon laŭ pli larĝa vidpunkto, konsiderante ekzemple la uzon de afiksoj en la aglutinaj lingvoj aŭ en la izolecaj lingvoj, kompare al kiuj la funkciado de Esperanto ne ŝajnas eksterordinara. Kvankam Esperanto aspektas hindeŭropa, ĝi pli forte similas al aliaj lingvoj.

Jen kiel Cyril Brosch prezentas la problemon :

Esperanton oni kutime klasifikas aglutina lingvo (ekz. Wells 1989: 27: “kiel konate”). Tamen Piron 1980 (passim, precipe 18–24) atentigas prave, ke la granda plimulto de la Esperantaj morfem-tipoj estas memstara kaj absolute neŝanĝebla, kiel en izolaj lingvoj. Por li tiu trajto estas eĉ la plej baza distingo inter la lingvotipoj (fleksiaj lingvoj: ĉiuj morfemoj estas modifeblaj – aglutinaj lingvoj: nur la gramatikaj morfemoj estas modifeblaj – izolaj lingvoj: neniu morfemo estas modifeblaj; p. 2s.), kaj kun etaj esceptoj Esperanto en sia profunda strukturo (kp. pri la koncepto Piron 1980: 18s.) funkcias laŭ ĉi-lasta modelo. (Brosch 2007, 4)

Tamen tiu distingo inter fleksiaj (t.e. fandaĵoj), aglutinaj kaj izolecaj lingvoj estas tro limigata kaj tro rigida. Oni devas klarigi tiun distingon per aliaj distingo, kaj aparte per uzo de diversaj indicoj, inter kiuj menciindas indico de variado (nombro de alomorfoj por unu morfemo), indico de sintezeco (nombro de morfemoj en unu vorto), kaj indico de kunfandiĝo (nombro de informoj en unu morfemo). Esperanto havas altan indicon de sintezeco, kaj malaltajn indicojn de variado kaj de kunfandiĝo. Tial Esperanto povas esti konsiderata kiel izoleca aŭ aglutineca lingvo, sed ne kiel fanda lingvo.

4 Parametroj en la funkciado de la afiksoj

Pro tiu aparta karaktero oni povas pli facile kompreni kial Esperanto havas multe da afiksoj. En PMEG (Wennergren 2024) pli ol ducent afiksoj estas listigitaj. Granda parto de ili estas fakaj, sciencaj kaj teknikaj, sed ankaŭ ekzistas tute oftaj kaj ordinaraj afiksoj en la lingvo. Jen sintezo de tiu afiksaro:

120	41	10	Oficialaj prefiksoj
		31	Oficialaj sufiksoj
	79	28	Prepozicioj uzataj kiel afiksoj
		21	Radikoj uzataj kiel afiksoj
30		Diversaj elementoj (numeraloj, tabelvortoj...)	
93		29	Maloftaj prefiksoj (fakaj, etimologiaj...)
		36	Maloftaj sufiksoj (fakaj, etimologiaj...)
		28	Sciencaj afiksoj kun numeralo funkcio

Tabelo 2: Distribuo kaj kvanto de afiksoj en Esperanto (laŭ Wennergren 2005)

Kvankam Tabelo 2 estas utila sintezo, necesas konscii, ke temas pri rezulto de evoluo. Kompreneble multaj el tiuj afiksoj (kiel la fakaj afiksoj) ne ekzistis komence en 1887. Eĉ pli ordinaraj afiksoj (ne-fakaj) aperis poste, ekzemple *-end* aŭ *-esk*. Tiu apero de novaj afiksoj ne ĉesis. Ekzemple estas uzata nuntempe nova sufikso *-iĉ* (vd. Kramer 2014), vira ekvivalento de *-in*. Kvankam ĝi estas plu diskutata kiel oportuna aŭ maloportuna novaĵo, tiu nova sufikso estas almenaŭ kohera laŭ la sistemo de la lingvo pro la ekzisto de la karesaj afiksoj *-ĉjo* kaj *-njo*, kiel montras Tabelo 3:

	ordinara sufikso	karesa sufikso
inseksa	<i>-in</i>	<i>-nj</i>
virseksa	<i>-iĉ</i>	<i>-ĉj</i>

Tabelo 3: Sistemaj rilatoj inter genraj afiksoj

Alia problemo estas la uzo de vorto-kategorioj. Ĉu prepozicio uzata kiel afikso plu estas prepozicio aŭ fariĝas vera afikso? Fakte tio ne profunde ŝanĝas la interesan karakteron de Esperanto, nome la eblecon uzi iun ajn elementon en aliaj vorto-kategorioj. La plej klara pruvo de tiu fenomeno estas la ebleco uzi afikson kiel radikon, t.e. la memstara uzo de la afiksoj.

Ĝuste pri tiu memstara uzo de la afiksoj, necesas ĉi tie distingi inter *derivila uzo* kaj *memstara uzo*. Tabelo 4 prezentas tiun distingon:

	Prefiksoj	Sufiksoj
Derivila uzo :	<i>reveni</i>	<i>dometo</i>
Memstara uzo :	<i>ree</i>	<i>eta</i>

Tabelo 4: Morfologiaj konstru-eblecoj baze de afiksoj

Tiu distingo povas esti ilustrata per ekzemploj eltiritaj de Tekstaro (Wennergren 2025). La ekzemplo (1) montras la uzon de *-end* kiel derivilo, kaj la ekzemplo (2) la uzon de *-end* kiel memstara radiko:

1. Mi komprenis, ke tiel ne plu eblas daŭrigi, io *farendas*. (La Kiso, Johansson 1995)
2. Tamen, ĉar ni atingis tiun konkludon, *endas* ne halti ĝis estos demonstrite plej klare kiel estas. (La Respubliko Platono, trad. Broadribb 1993)

Kiam afikso estas uzata memstare, ĝi povas ricevi la diversajn finaĵojn kiel ordinara radiko. La ekzemplo (3) ilustras la uzon de *-n* finaĵo, kaj la ekzemplo (4) la uzon de *-j* (plurala finaĵo):

3. La singardema redaktoro, kvankam li staris sekure, tamen volis reiri malantaŭ la baron, remetis la manon sur la turnilo kaj faris paŝon *reen*. (La Majstro kaj Margarita, fragmentoj, Pokrovskij 1991)
4. Tiu inĝenia strukturaĵo ne rivelas tamen diferencon inter *praaj* enkavernaj desegnaĵoj kaj tiuj de Picasso. (Kien fluas roj' Castalie, Muraŝkovskij 1984)

Kiel montras tiuj ekzemploj, la memstara uzo de afiksoj povas okazi por prefiksoj (ekzemploj 3 kaj 4), aŭ por sufiksoj (ekzemplo 2). Oni ankaŭ povas konstati, ke la memstara uzo povas okazi per aldono de verba finaĵo (2), de adverba finaĵo (3), de adjektiva finaĵo (4). Kompreneble tio ankaŭ povas okazi per aldono de substantiva finaĵo, kiel montras la ekzemplo (5), kie oni trovas la vortojn *ino* kaj *estro*:

5. dank'al tiu instinkto naskita de la ĵaluzeco, ŝi divenis ke io teksigās kontraŭ ŝia feliĉeco, kaj ke la *ino* ŝin anstataŭonta en la koro de *l'estro* jam estis trovita. (Kastelo de Prelongo, Vallienne 1907)

Tiu ekzemplo (5) estas relative malnova (1907), sed tiu mekanismo estas plu uzata, eĉ se temas pri tute nova afikso kiel la afikso *-iĉ*, kiun ni jam menciis. Laŭ PMEG (Wennergren 2024, 39.1.13) tiu sufikso plej verŝajne estis proponita la unuan fojon en 1976, dum la sufikso *-in* ja estas en la lingvo ekde la komenco (1887). Danke al tiu ekzemplo (5) ni konstatas, ke *ino* kiel memstara vorto jam ekzistis en 1907 (kaj estas multaj ekzemploj de tiu vorto *ino* en Tekstaro). Tamen la vorto *iĉo* aperis nur lastatempe kiel memstara uzo de la sufikso *-iĉ*. Tion montras la ekzemplo (6) (notindas, ke ĝi estas ĝis nun la sola ekzemplo en Tekstaro):

6. Kiam mi aŭdas vin ride diri: "Nur unu fojon iu *iĉo* purigas la vazaron kaj jen kio okazas!", mi sentas min malĝoja, ĉar mi ŝatus ricevi empation rilate al mia fingra vundo. (Kontakto 2011-2019)

Do ekzistas evoluo de la sistemo de afiksoj, kaj ankaŭ evoluo de ilia uzo kiel memstaraj radikoj. Ĝuste pri tio parolas interalie John Wells. Jen citaĵo el *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*:

Skemisma vortfarado ricevis antaŭenpuŝon el unu alia direkto, nome la ekuzo de afiksoj kiel memstaraj radikaloj. En la komenco, en 1887, oni trovas nur *eble*. Baldaŭ poste venis *eblo*, *indo*, *edzo*, *ree*, *ano*, *dise* el la plumo de Zamenhof mem, kaj el tiu de Grabowski *emo*, *eksa*. Sekvis *eco*, *estro*, *igi*, *eta*, *ingo*, *ino*, *aro*, *ilo*, kaj – de Kofman – *iĝi*. Nur post la jarcentoŝanĝo venis *ejo*, *aĵo*, *ido*, *ulo*, *eki*. Ne Zamenhof, sed aliaj esperantistoj volantaj ekspluati la latentajn kapablojn de la lingvo, poste ekuzis *adi*, *ega*, *ero*, *ujo*, *gea*, *praa*, *ismo*. Eĉ *aĉa*, hodiaŭ tre ŝatata adjektivo, dankas sian unuan

aperon al Kalocsay en 1924. Sed tiun ideon ni ankoraŭ ne aplikis tiom, kiom eblas. Kial, ekzemple, ni ne diru *ujivo* anstataŭ *kapacito*? (Wells 1989, 58)

Tiu citaĵo parolas pri evoluo, kiu jam dekomence aperis, sed kiu disvolviĝis iom post iom, kaj kiu eventuale plu daŭras ĝis nun. Ĉu oni povas konfirmi tiun intuicion de Wells per datumoj? Kiel aspektas la evoluo de tiu fenomeno? Por pristudi tiun evoluon de la lingvo, ni konsideros nun datumojn el Tekstaro, danke al kiu ni faris esploron de la evoluado rilate al tiu memstara uzado de la afiksoj.

5 Progreso de la memstara uzo

Por esplori la memstaran uzon de la afiksoj, ni konsideris la 41 bazajn afiksojn, kaj ni unue esploris la frekvencon de la afiksoj en ilia ordinara pozicio, t.e. kiam ili estas uzataj kiel deriviloj.

Tiu pozicio estas ĉe la komenco de vorto se temas pri prefiksoj, kaj fine de la vorto (ĵus antaŭ la finaĵo) se temas pri sufiksoj. Poste ni konsideris tiujn afiksojn kiam ili estas memstare uzataj, do kiam ili aperas sen alia vort-elemento krom la aldono de la gramatikaj finaĵoj.

Por tiu esploro ni uzis la korpuson “Tekstaro” (Wennergren 2025). Laŭ praktika vidpunkto ni konsideris kvar simile longdaŭrajn periodojn, kun daŭro de 30 jaroj:

- (1) la unua periodo de 1887 ĝis 1917;
- (2) la dua periodo de 1918 ĝis 1948;
- (3) la tria periodo de 1949 ĝis 1979;
- (4) la kvara periodo de 1980 ĝis 2010.

La rezulto de tiu esploro konfirmas klaran evoluon de la memstara uzo de la afiksoj.

La nombro de aperoj regule kreskas de unu periodo al la sekvanta: la nombro de aperoj (por unu miliono da vortoj) estas ĉ. 57 memstare uzataj afiksoj dum la unua periodo (de 1887 ĝis 1917), ĉ. 88 aperoj dum la dua periodo, ĉ. 105 aperoj dum la tria periodo, kaj ĉ. 110 dum la kvara periodo.

Inverse la derivila uzo de la afiksoj estas pli malpli stabila. Notindas nur iom malpli da uzo dum la tria periodo, kiun povus eble klarigi la enkonduko de multaj neologismoj dum tiu periodo, kiu malpliigis la uzon de derivaĵoj. Ĉiukaze, la proporcio (t.e. procentaĵo de memstara uzo kompare al la derivila uzo de afiksoj) ankaŭ prezentas klaran evoluon : 2,54 % dum la unua periodo ĝis 4,88 % dum la lasta periodo.

Nombro de aperoj (/ miliono da vortoj)	Memstara uzo de la afiksoj	Derivila uzo de la afiksoj	Proporcio (memstara // derivila)
1887-1917	57,22	2197,28	2,54 %
1918-1948	88,87	2191,23	3,90 %
1949-1979	105,73	1971,82	5,09 %
1980-2010	110,43	2152,17	4,88 %

Tabelo 5: Ĝenerala evoluo kaj proporcio de la memstara uzo de la afiksoj

Se oni rigardas pli detale tiun evoluon, oni povas rimarki, ke ĉiuj afiksoj ne sekvas saman evoluon. Do temas ĉi tie pri ĝenerala evoluo de la lingvo, kvankam tiu aŭ tiu alia afikso povas evolui malsame. Pro tio ni rapide prezentos kelkajn ekzemplojn de afiksoj, por montri kiel tio povas evolui.

Antaŭ ol konsideri la memstaran uzon de la afiksoj, oni unue konsideru la derivilan uzon de la afiksoj. Kiel tiuj evoluas kiel ordinaraĵoj por formi derivaĵojn? Tabelo 6 donas kelkajn ekzemplojn.

/ miliono da vortoj	-end	-ebl	-ar	eks-	-um	-uj	-in	-iĝ	-aĵ
1887-1917	0	1387	1781	47	621	937	7634	9540	4118
1918-1948	50	1761	2102	81	606	619	5937	9559	3535
1949-1979	70	1798	3766	163	646	402	3246	8896	4041
1980-2010	165	2444	3935	171	1092	426	2124	8963	3900

Tabelo 6: Ekzemploj de evoluado por la derivila uzo de la afiksoj

Oni konstatas progreson por afiksoj kiel *-end* (kiu aperis inter la du mondmilitoj), kaj ankaŭ por *-ebl*, *-ar*, aŭ *eks-*. Pri aliaj afiksoj estas iu evoluo, kiu okazis malfrue, ekzemple *-um* vere evoluis nur dum la kvara periodo.

Aliflanke kelkaj afiksoj malpli ofte aperas. Klara ekzemplo de tio estas la sufikso *-uj*, kiu malpli ofte estas uzata por la landnomoj (kiuj pli ofte ricevas nun la sufikson *-io*). Alia ekzemplo estas la sufikso *-in*, unue pro tendenco ne indiki la in-sekson en la derivaĵoj, tendenco kiu probable konfirmiĝos pro la apero de novaj afiksoj kiel *-iĉo*. Fine estas afiksoj, kiuj ne prezentas klaran evoluon, ekzemple *-iĝ* aŭ *-aĵ*. Fakte, tiuj sufiksoj rilatas al la strukturo de la verbo, kaj ŝajne ne estas grava evoluo ĉi-rilate.

Nun ni konsideros la situacion pri la memstara uzo de la afiksoj.

Kompreneble estas ĝenerala tendenco al pli ofta uzado, sed se oni rigardas pli detale la rezultojn, povas esti kelkaj diferencoj inter la afiksoj. Tabelo 7 montras kelkajn ekzemplojn.

/ mili- ono da vortoj	-ad	-an	-eg	-et	-em	-ebl	-iĝ	-estr	re-
1887- 1917	0,00	23,71	3,39	26,25	12,28	934,9	0,42	246,42	229,07
1918- 1948	3,91	47,86	75,20	181,66	114,27	1416,1	248,07	104,50	303,74
1949- 1979	7,42	78,70	111,37	187,11	164,83	1297,9	250,96	92,07	65,34
1980- 2010	12,30	87,06	215,81	228,50	159,89	1426,1	239,45	101,66	64,38

Tabelo 7: Ekzemploj de evoluado por la memstara uzo de la afiksoj

La progreso povas esti videbla dum ĉiuj kvar periodoj. Tio estas klare videbla por la sufiksoj *-ad*, *-an*, *-eg* kaj *-et*. Tamen, kelkaj afiksoj montras evoluon nur dum unu aŭ alia periodo, kiu kvazaŭ funkcias kiel grada ŝtupo, ekde kiam la memstara uzo estas stabila. Ekzemple tio estas videbla por *-em* (stabileco ekde 1949), aŭ por *-ebl* kaj *-iĝ* (kiuj fariĝas relative stabilaj jam ekde la dua periodo). Fine oni observas malprogreson aŭ malrapidiĝon por kelkaj afiksoj, ekzemple por *-estr* (malpli uzata memstare), aŭ por *re-* (kies memstara uzo falas ekde la tria periodo, kun stabila frekvenco en la kvara).

Tiuj ŝajnaj esceptoj ne modifas la ĝeneralan situacion: la memstara uzo de la afiksoj forte plioftiĝis. Kaj tio estas aparte grava, ĉar ĝis nun ni ne aldonis alian memstaran uzon de la afiksoj, kio estas la uzo de afiksoj kiel bazo de derivaĵoj. Tiuj kompleksaj memstaraj derivaĵoj estas interesa disvolviĝo de tiu fenomeno. Jen kelkaj ekzemploj por ilustru tiun fenomenon (ekzemploj 7 ĝis 10).

7. – Mia *etulo*, ne temas plu pri la vulpo! (La Eta Princo 1961)
8. La dua UK en Japanio estis do pli multnombra ol la unua, kiu okazis en Tokio en 1965 kaj *arigis* 1710 aliĝintojn. (Revuo Esperanto 2002–2007)
9. La *malebleco* akiri la kvantojn de fendebla materialo necesajn por fabriki eksplodaĵoj, estis longtempe la plej bona garantio ke ŝtato respektu siajn politikajn engaĝiĝojn. (Le Monde diplomatique en Esperanto 2005–2007)
10. La demisio de Nikola Rašić (...) igis eksredaktoron de Esperanto István Ertl kaj *eksestraranon* Kalle Kniivilä fondi interretan gazeton Libera Folio. (Revuo Esperanto 2002–2007)

Verdire tiuj formoj estas malfacile esploreblaj per la rimedoj de *Tekstaro*. Oni facile povas supozi, ke ili probable ankaŭ plioftiĝis iom post iom, pro tio ke la afikso unue fariĝas memstara radiko (*eta*, *aro*, *ebla*, *estro*), kaj nur poste povas ricevi aliajn afiksojn (*estro* > *estraro* > *estrarano* > *eksestrarano*). Do la

frekvenco de *estro* ŝajne maloftiĝas, sed samtempe multobliĝas diversaj derivaĵoj de *estro* (*estraro, estrarano...*), kaj tiuj derivaĵoj ne aperas en la nuna statistika esploro.

Kial tiu manko? Fakte, oni povas senprobleme identigi afiksojn unuope uzatajn, sed se ili kombiniĝas, ili aperas kiel ordinaraj (derivilaj) elementoj. Do *eksestraranon* estas analizata kiel apero de prefikso *eks-* kaj apero de sufikso *-an*, sed ne kiel memstara uzo de la afikso *-estr-*. Por identigi tiun, necesus eltrovi ĉiujn eblajn kombinojn baze de ĉiu afikso, kio estas ege postulema tasko. Certe tio estas ĝis nun manko de la nuna esploro, sed oni povas opinii, ke la ĝeneralaj rezultoj, kiuj estas ĉi tie prezentitaj, ne estos profunde kontraŭdirataj de pluaj esploroj.

6 Konkludo kaj esploraj perspektivoj

Konklude gravas substreki la demandon pri evoluo de la lingvo Esperanto. Tio estas serioza afero, ĉar vivanta lingvo estas evoluiganta lingvo. Tamen, evoluo ne signifas malkohereco aŭ disdialektiĝo. La afero ĉi tie estas, ke Esperanto evoluas rilate al la memstara uzo de la afiksoj konforme al la interna sistemo de la lingvo, kiu dekomence ebligis tian evoluon. Nun post pli ol 130 jaroj da uzado de la lingvo, ni povas retrorigardi tiujn evoluojn kaj esplori kiel Esperanto jam evoluis.

Aliflanke, oni ne pritraktis ĉi tie alian gravan aspekton de tiu memstara uzo de la afiksoj, nome la semantika aspekto de la afero. Fakte, se novaj radikoj aperas pro tiu memstara uzo (ekzemple: *aro, eta, eki, eco, ejo...*), ili fariĝas konkurencaj formoj apud jam ekzistantaj vortoj, tiel ke *aro* estas kvazaŭ sinonimo de *grupo*, *eta* fariĝas sinonimo de *malgranda*, *eki* estas sinonimo apud *komenci*, *eco* apud *kvalito*, *ejo* sinonimo de *loko*... Sed ne ekzistas perfektaj sinonimoj. Sinonimoj similas nur parte, kaj necesas konscii pri la diferencoj, kiuj plu ekzistas. Kompreneble, se tiuj diferencoj ne sufiĉas, la du sinonimoj fariĝas redundaj, kaj normale unu el ili malaperas, pro tio ke ĝi fariĝas superflua. Sed se ili estas ambaŭ plu uzataj, oni devas supozi, ke ĉiu el ili havas propran karakteron. Pli precize tio signifas, ke *aro* ne estas simpla *grupo* (kaj pro tio, *vortaro* ne estas simpla grupo da vortoj, kaj *homaro* ne estas simpla grupo da homoj). Simile *eta* ne estas perfekta sinonimo de *malgranda*, kaj *eki* ne estas *komenci*; *eco* ne estas sinonimo de *kvalito*, kaj *ejo* ne estas simpla *loko*.

Tio ŝajnas hipotezo plu esplorinda en la estonteco. La apero de tiuj memstaraj formoj plifaciligas la komparon kun proksimaj sinonimoj, kaj oni povus same esplori la diferencon, kiu ekzistas inter la afiksoj kaj la ofte uzataj vortoj per kiuj oni ĝenerale provas klarigi ilian signifon kaj

funkciadon.² La evoluo de la memstaraj afiksoj tiel havas tiun kromefikon, ke ili ebligas pli ĝustan komprenon de la signifo de la derivilaj afiksoj kaj de ilia funkciado en la sistemo de la lingvo Esperanto. Ankaŭ per tiu vojo Esperanto pliriĉiĝas kaj fariĝas pli natura danke al la efiko de lingva evoluo.

Bibliografio

- Blanke, Detlev. 1985. *Internationale Plansprachen: eine Einführung* (Sammlung Akademie-Verlag 34 Sprache). Berlin: Akademie-Verlag.
<http://d-nb.info/1206055073/34> (04.05.2025)
- Brosch, Cyril. 2007. *Kia lingvo estas Esperanto laŭ tipologia vidpunkto?* Studlaboraĵo Poznań: Interlingvistikaj Studoj, Universitato Adam Mickiewicz.
http://www.cyrilbrosch.net/wb/media/ese_eg_4.pdf (02.03.2025)
- Dasgupta, Probal. 2021. "Pri eteta problemo en la Esperanta morfologio." *Esperantologio / Esperanto Studies* 10: 9–23. <https://doi.org/10.59718/ees29814>
- de Saussure, Ferdinand. 1916. *Cours de linguistique générale*, kritika eldono, redaktis Tullio de Mauro, 1995. Paris: Payot & Rivages. – traduko al Esperanto de Fernando Pita. 2022. *Kurso de ĝenerala lingvistiko*. La-Chaux-de-Fonds: LF-koop.
- Dols Salas, Nicolau. 2012. "Phonology, morphology and the limits of freedom in an artificial language." En *Jezik Komunikacija Informacija / Language Communication Information*, redaktis Ilona Koutny kaj Piotr Nowak, vol. 7: 37–52. Poznań: Rys.
https://wydawnictworys.com/media/products/964b533657cbd87ca977ae6c2f100a32/attachments/pl_PL/spis-tresci.pdf (04.05.2025)
- Duc Goninaz, Michel. 1988. "Planification et régularité(s): quelques réflexions sur l'espéranto." *Travaux du Cercle Linguistique d'Aix-en-Provence* 6: 79–91.
- Fiedler, Sabine kaj Cyril Robert Brosch. 2022. *Esperanto – Lingua Franca and Language Community* (Studies in World Language Problems 10). Amsterdam/Philadelphia: Benjamins. <https://doi.org/10.1075/wlp.10> (04.05.2025)
- Gledhill, Christopher. 2000. *The Grammar of Esperanto. A Corpus-based Description* (Languages of the World / Materials 190). München: Lincom Europa.

2 Tiu demando estis klare identigata jam de Gledhill (2000). Estontaj esploroj pri tiuj diferencoj inter memstaraj formoj kaj ties sinonimoj espereble povus alporti klarigojn pri la utileco de tiu fenomeno de memstareco de la afiksoj en la lingva sistemo de Esperanto.

- Kiselman, Christer. 2011. "Variantoj de esperanto iniciatitaj de Zamenhof." *Esperantologio / Esperanto Studies* 5: 79–149.
<https://www.cb.uu.se/esperanto/ees5.pdf>
- Koutny, Ilona. 2015. "A typological description of Esperanto as a natural language." En *Język Komunikacja Informacja / Language Communication Information*, redaktis Ilona Koutny, vol. 10: 43–62. Poznań: Rys.
https://wydawnictworys.com/media/products/ad5b2e0fa12b-6169bcd7b95040b1a6f2/attachments/pl_PL/spis-tresci.pdf (04.05.2025)
- Koutny, Ilona. 2018. "De la planlingvo de Zamenhof ĝis nature disvolviĝanta lingvo: etapoj de la evoluo de Esperanto." En *Ludwik Zamenhof. Okaze de la centa datreveno de la morto. Aktoj de la kunveno Romo, 11 decembro 2017*, 89–98. Roma: Accademia Polacca delle Scienze, Biblioteca e Centro di Studi a Roma.
http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/IlonaK_De_planlingvo_gxis_natura_2017.pdf (04.05.2025)
- Kramer, Markos. 2014. "Esperanto kaj sekso." *Lingva Kritiko. Studoj kaj notoj pri la Internacia Lingvo. Esperantologio Interreta*.
<http://lingvakritiko.com/2014/10/16/esperanto-kaj-sekso/> (02.03.2025)
- Lo Jacomo, François. 1981. *Liberté ou autorité dans l'évolution de l'espéranto*. Doktoriga disertacio. Parizo: Universitato Parizo V.
- Mattos, Geraldo. 1987. *La deveno de Esperanto*. Chapecó: Fonto.
- Planchon, Philippe. 2021. "Diakronio kaj evolu-fazoj de la leksiko kaj de la vort-farado en Esperanto." *Internacia Pedagogia Revuo* 51, kajero 4: 39–49.
- Waringhien, Gaston. 1959. *Lingvo kaj vivo*. Antverpeno/La Laguna: Stafeto.
- Waringhien, Gaston. 1980. *1887 kaj la sekvo...* La Laguna: Stafeto.
- Wells, John. 1989. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Wennergren, Bertilo. 2024. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Partizán-ske: E@I La Ranetoj.
<https://www.bertilow.com/pmeg> (02.03.2025)
- Wennergren, Bertilo. 2025. *Reta Korpuso « Tekstaro »*. Projekto iniciatita kaj financata de Esperantic Studies Foundation ekde 2002.
<https://tekstaro.com> (datum-esploro laŭ la versio disponebla je 13.06.2024)
- Zamenhof, Ludwik Lejzer. 1887. *Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ* (Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro). Varsovio: Ĥaim Kelter [presejo].

Pri la aŭtoro

Philippe Planchon estas asocia profesoro en la universitato de Tours. Li estas membro de la Liĝera Lingvistika Laboratorio (UMR 7270). Liaj esplor-kampoj estas lingvistiko de Esperanto kaj de la konstruitaj lingvoj, konstruado de la signifoj kaj leksika semantiko, kadre de la teorio de la enunciativo.

Retadreso: philippe.planchon@univ-tours.fr

About the author

Philippe Planchon is an associate professor in linguistics at the university of Tours. He is a member of the Loire Linguistics Laboratory (UMR 7270). His research focuses on the linguistics of Esperanto and constructed languages, the construction of meaning and lexical semantics, in the framework of the theory of enunciation.

Sur l'auteur

Philippe Planchon est maître de conférences à l'université de Tours. Il est membre du Laboratoire Ligérien de Linguistique (UMR 7270). Ses domaines de recherche portent sur la linguistique de l'espéranto et des langues construites, la construction du sens et la sémantique lexicale, dans le cadre de la théorie de l'énonciation.

On the development of affixes and their use as independent items in Esperanto

Abstract: Despite the fact that Esperanto was originally conceived as a language project, it has evolved into a living language for its community of speakers. The use of an extensive system of affixes in Esperanto could be seen as a symptom of its artificial origin. However, from an etymological perspective, Esperanto borrowed its affixes from natural languages, essentially from Indo-European. Yet the autonomous use of affixes in Esperanto presents some original characteristics. This leads us to analyse how affixes operate in Esperanto, in particular from a diachronic perspective. To achieve this, we conduct a survey of how affixes have evolved in the *Tekstaro* corpus, looking at derivational forms compared with autonomous use. The development of this system can offer insights into the linguistic processes involved in a language like Esperanto, which, after a significant period of time, is now in the process of becoming a natural language.

Keywords: Affixes; Diachronic development; Esperanto; Independent affix usage

Évolution des affixes et de leur emploi autonome en espéranto

Résumé: Bien que l'espéranto ait été conçu à l'origine comme un projet de langue, il s'est développé jusqu'à devenir une langue vivante pour sa communauté de locuteurs. L'utilisation d'un riche système d'affixes en espéranto pourrait être vu comme le symptôme d'une origine artificielle. Cependant, d'un point de vue étymologique, il s'avère que l'espéranto a emprunté ses affixes à des langues naturelles, principalement des langues indo-européennes. Pourtant, un problème surgit lorsqu'on considère l'emploi autonome qui peut être fait de ces affixes, parce que cet emploi semble quelque peu inhabituel. Cela nous conduit à nous intéresser au système des affixes de l'espéranto en examinant son fonctionnement dans une perspective diachronique. Cette étude est basée sur le corpus *Tekstaro*, et procède par une comparaison entre les usages dérivationnels et autonomes de ces affixes. L'évolution de ce système permet d'éclairer plus en profondeur les processus linguistiques qui se trouvent impliqués par une langue comme l'espéranto, laquelle tend à devenir une langue naturelle après une période de temps significative.

Mots-clés: affixes; développement diachronique; espéranto; usage indépendant des affixes